



NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc**

Marto 2008

Tartalom

MARTO	3
Printempo	3
La plej bela virino	4
HUNGARLANDAJ EKSKURSOJ.....	4
Abaújszántó (Abaujsanto)	4
Prezento de la „Sivák Barnabás” Popolkanto-Rondo de urbo Abaujszántó	6
ŜERCO	7
La festo de punto en Bábolna, la 25-26-an de aŭgusto 2007-a	8
SAGDIROJ.....	13
Historio de la Miskolca esperanto-Movado	13
Trafa respondo.....	16
Ripozo	16
La 2008-a, estas jaro ankaŭ de la Lingvoj.....	17
Patrujo	17
Famaj Tagoj, Mondotagoj de Marto	18
FAMOJ.....	19
JULIO BAGHY.....	20

MARTO



Karaj legantoj!

Se ni diras la monaton Marto, ni pensas tuj pri la PRINTEMPO!

Kaj, kun la printempo ni pensas pri la reviviĝo de la granda, admirinda NATURO.

Ni virinoj, kaj la infanoj pensas pri la Virintago kaj pri la PASKO.

La viroj pensas, pri la fresiĝantaj virinaj ridetoj, pri la AMO.

La printempan ĝojon, plej bone ni povas esprimi kun la sekva poemo de Maurice Berger, kaj kun la malsupra fabelo, tradukita de nia kara samideano Bronislav Ĉupin en Udmurtio.

Akceptu ambaŭ bonkore:

Maurice Merger Printempo

Rebrilas la suno en blua ĉielo;
Verdiĝas kamparo, ekfloras jonkviloj.
Blovetas zefiro. Triladas kardelo.
Ekzumas abeloj. Fajfadas la merloj.

En fago, surbranĉe, bluetas garolo;
En veproj kaŝita, alvokas kukolo,
Respondas silvioj, paruoj kaj fingroj,
Pariĝas perdrikoj. Burĝonas stringoj.

Multopaj, sur herbo, ĝojadas infanoj;
En rojo vadadas ruĝvangaj knabinoj;
Surbenke, kontentaj, ridetas olduloj;

Promenas amantoj, kantadas junuloj.
Revenis hirundoj. Anonci 'stas tempo:
„Foriris fivintro, alvenis printempo.”

(El la Kultura revuo LITERATURA FOIRO / 1982 jaro- Nro 72)

Sofron Danilov

La plej bela virino

Iuj vetis: kiel aspektas la plej bela virino? Unu ŝatas bruligajn nigrajn okulojn, la alia – grizajn kun blueteco, kaj iu – brunajn, promesridetajn. Al unu plaĉas mallonge tonditaj haroj, al la alia – longaj, onde bukclantaj ĝis la kalkanoj. Unu admiras gracian altkreskulinon, alia – etan, leĝeran, fajne elegantan. Kaj al ĉiu la propraj prezentoj ŝajnas sole ĝustaj. Ĉiuj provoj persvadi alidecidon de unu al la alia estas senrezultaj.

Ili venis al saĝa vivsperta maljunulo kaj diras:

– Ni jen ekvetis kaj neniel povas veni al konkludo. Diru, respektinda homo, kia virino estas la plej bela?

Longe rigardis la maljunulo pintojn de foraj montoj bluetantaj post nuboj kaj, serene ridetinte, respondis:

– La amata!

Tradukis Bronislav Ĉupin

HUNGARLANDAJ EKSKURSOJ

Nun, revenante en nian landon, ni denove vojaĝos, sed nun al la Tokaj-Montosuba Vinregiono

Abaújszántó (Abaujsanto)

Ĝia situo, atingo

Abaújszántó estas eturbo kun 3500 geloĝantoj. Oni povas trovi ĝin: en departamento Borsod-Abauj-Zemplén, je 50 km distanco de Miskolc al nordoriento, ĉe la subo de la montaro Zemplén. Sur la landvojo el okcidento: deflankiĝante de sur la 3-a numera ĉefvojo, de sudo: el direkto de urbo Szerencs ni povas alproksimigi ĝin. Oni povas trovi ĝian fervojstacion kaj haltejon sur la Szerencs-Hidasnémeti fervojo.

Historio

La setlejo Abaújszántó estiĝis ĉe renkontiĝo de du regionoj Abaúj kaj Zemplén, laŭ la grava komerca vojo, kunliganta la urbojn Tokaj kun Kassa (nun Košice en Slovakio) kaj Debrecen kun Krakovo. Ekde jarcentoj ĝi estas la ekonomia, kultura centro de la regiono.

La unua skriba mencio de la probable jam dum regado de Stefano la Sankta per preĝejo sispnata setlejo devenas el 1275. Pro ĝia favora situo, ĝia civitaniĝadeco baldaŭ elformiĝis kaj dum la 15-a jc. Ĝi atingis kapaarurbet-rangon. Tiam post Kaŝŝa kaj Gönc (Goenc) ĝi estis la tria plej granda urbo en la departamento Abauj, per gravnombran anaron havanta metiista kaj komercista tavolo.

Ĝiajn eminentajn vinojn oni portis ankaŭ eksterlandon. Dum la turka erao ĝia evoluo malrapidiĝis. Ĉi regiono iĝis unu centro de la antaŭeniĝanta reformacio. Pastoroj de Abaujszántó partoprenis en la biblio-traduka laboro de Károlyi, Gáspár (Gasparo Karoji). En la urbon – kio estis longe posedaĵo de familio Rákóczi – post 1711, apud la malmultiĝantan loĝantaron, oni envokis germanlingvajn setlejanojn. La urbo vivis sian florepokon en la dua duono de la 19-a jc. Tiam, post Kaŝŝa, ĝi estis la dua plej signifa urbo en la departamento. La 19. kaj 20. jc-aj eventoj /filoksero-endemio, petro de urborango(en 1902), Trianon) senteme malbone tuŝis ĝian evoluon. En 1962 ĝi ĉesis esti distrikta centro. Kontraŭ tiu-ĉi, ĝi gardis sian centro-rolon en sia ĉirkaŭaĵo, kaj dum 2004-a jaro ĝi denove atingis la urborangon.

Vidindaĵoj, famecoj

Dum la jarcentoj, Abaujszántó riĉiĝis multe da valoraj konstruaĵoj. Preĝejoj de kvin religioj troveblas en la urbo. La plej malnova estas – originale sur romepokajn bazojn konstruita – romkatolika preĝejo. Kontraŭ la 18 jc-aj trakonstruoj, Ĝi konservis la gotikajn stil-trajtojn montritajn de efiko de la katedralo de Kaŝŝa (Nun Košice en Slovakio) . La kalvinana preĝejo konstruiĝis dum 1752. El 1798 devenas la copf-stila preĝejo de la luteranoj.

La greka katolika preĝejo konstruita en antaŭo de la 19-a jc. atentinda estas ĝia ikonostazo, pretiĝis en 1798.

Ankoraŭ staras ankaŭ la preĝejo, la sinagogo de la iam tie-ĉi vivanta judaro. Sur la ĉefstrato kelkaj domoj ankoraŭ gardas la etoson de la 18-19 jc-a kamparurbeto.

El inter ili unu estas la – „Ulanus” aŭ „Kapitány-ház” (Domo - de Kapitano”) – en ĝiaj ĉambroj ni povas rigardi la „Lokhistorian-kolekton” kaj la „Kalocsay-memorĉambbron”. La interesaĵo de ĉi klasicista stila konstruaĵo estas, en ĝia kelo la tn. Profunda-puto.

Sur la Nordorienta urborando en Cekeháza estas trovebla la klasicista stila kastelo – devenanta el la 1820-a jaro – de la familio Patay.

En la urbocentro estas starigita la busto de d-ro Kalocsay, Kálmán (Kolomano Kaloĉai) esperantista kuracisto (lingvisto, poeto, arta-tradukisto), naskito de la urbo.

Abaujszántó apartenas al la „Tokaj-Hegyalja”(Tokaj-Montosubo) Vinregiono, tiel ĝi estas parto de la Mondoheredaĵo. Ĝiaj kelvicoj atendas la preferantojn de la noblaj-vinoj.

Sur la urborando eksplodanta fonto havas kuracakvon. Tie-ĉi estas la strando.

Elirante de la urbo, ni povas fari agrablajn ekskursojn al la netuŝitaj pejzaĝoj de la montaro Zemplén: en la valon - de rivereto A r a n y o s (Aranjoŝ), aŭ al la montoj Sátor kaj Krakkó (Ŝator=Tendo, kaj Krakovo).

- Kultura vivo –

Kio progresas en intereso de gardo kaj daŭra bela uzo de la gepatra lingvo.

Prezento de la „Sivák Barnabás” Popolkanto-Rondo de urbo Abaujszántó



„La szántó-a larğa strato estas ho, sed tre gleboza... - admirinde sonas la bela kamplaborista popolkanto sur lipo de kantisto de la popolkantogrupo „Sivák, Barnabás” de Abaujszántó.

Ĉi popolkantogrupo ekviviĝis en novembro de 2004, kiel posteulo de la kvarcentjaron ekvivinta miksa-horo. La nun jam emerita, sed en la urbo longtempe laborinta bazlerneja direktorino Czina, Imréné: onjo Erzasike (Sinjorino Cina, onjo Erjike=Elinjo) kunverbuvis la membrojn de la ĉi tempa popolkantorondo. Ŝi petis por grupon gvidi sinjorinon Kalina, Ferencné (onjon Gitta) vivanta en la najbara setlejo. Ne estis miraklo ŝia elekto. Ja, ŝi havas grandan fakscioplenan pasinton. Ŝi gvidas unu popolkantgrupon ekde 22 jaroj en vilaĝo Tállya kaj paralele kune kun ili, ŝi kantis dum 6 jaroj ankaŭ kun la virĥoro de vilaĝo Taktaharkány. Popolkantogrupon de oĉjo Ŝivák – post ĝia fondiĝo 6 monata kunkantado – ŝi pretigis al landa konkurso, de kie ili hejmenvenis per la honorigo „Arĝentgrado”- Poste la grupo alprenis la nomon „Ŝivak, Barnabaŝ”: la nomon de la fama, kantanta ŝafisto de al la urbo aneksita setlejo Cekeháza. Li estis distingita per honoro „Majstro de la popularto”.

La 15-16 kantistoj diligente partoprenas la kantoprovojn ekde 6 jaroj, kiuj ĝis nun tre bele rezultis.

La kantoĥoro estas la fenomeno de la urbo. Ili estas rolantoj de preskaŭ ĉiu ekagado. Iliaj ĉeesto, kantanta bonhumuro, levas ĉefe la aranĝaĵetason de la :” Tagoj Drinkantaj- kaj Vinrikoltaj”. Ankaŭ la najbaraj setlejoj ĝoje invitas ilin por rolado, kiun ili same ĝoje plenumas, sed ankoraŭ nun senpage. Sed, ili gastrolis jam ankaŭ en aliaj pli foraj lokoj de la lando, en: Székesfehérvár, Martfű, Tarpa, Mezőkövesd, Pálháza, Múcsony – ili aŭdigis siajn voĉojn je ĝojo de la kanton ŝatantoj.

Ilia subtenanto estas la korporacio de la Urba Konsilio.

Ilia laŭorda provtago estas la mardovespero, kies lokon certigas al ili la Kulturdomo.

Ili deklaras, ke oni devas konservi ĉion el la pasinto, kiu bonas kaj valoras, kaj devas rehavigi en nian novan vivon, por ke ĝi igu pli plena, pli perfekta la vivon de nia popolo, la nin sekvantaj generacioj.

Finante ĉi-ĉion, staru antaŭ ni la admonanta penso de poeto Babits, Mihály: (Mikelo Babiĉ)

„Vi estas heredanto de spiritaj trezoroj de viaj praŭloj,
Vi estas la sekvanta, por konservi ilin.”

(Prezenton de s-rino Kalina, Ferencné – esperantigis Adrienne, s-rino Pásztor)

ŜERCO

La direktoro

La direktoro de hotelo diras al la kelnero:

- Kial vi disputas kun la kliento? Ĉu vi ne scias, ke la kliento ĉiam pravas?
- Sed, la kliento diras, ke vi estas ŝtelisto.

(Espero Katolika, 1974-03.)

La festo de punto en Bábolna, la 25-26-an de aŭgusto 2007-a
- Daŭrigo -
Parto II-a



Bábolna

El Budapeŝto ĝis – la 20 000 enloĝantojn havanta urbo situanta sur la dekstra Danubbordo – Komárom; ni vojaĝis trajne, kaj de tie per aŭtobuso al Bábolna.

De nia alveno al nia forvojaĝo ni havis multe da tempo, tiom sufiĉis por urborigardado en ĉirkaŭaĵo de la aŭtobus-stacio. Ni rigardis la riveron Duna (Danubo), kiu grize onduliĝis en sia kavo. Ni vidis deekstere la fortikaĵon de Komárom, kie Mór Jókai (la verkisto) sinkaŝis dum iomtempe post la 1848-a revolucio. Ni rememoris, kiele fama estis la tie iam estanta benediktana klastro, kaj en la orienta urboparto oni malkaŝis romiaepokajn retrovaĵojn. Sur la urbomapo estanta apud la aŭtobus-staĉejo, ni rimarkis, ke en urbo Komárom estas strato nomita pri Zamenhof.

Dum vojaĝo al Bábolna, la aŭtobuso preteriris plurajn ŝortnomajn setlejojn. Ĉie ni admiris la malnovegajn el briko konsistantajn terkulturistdomojn (nek unu estis konstruita el argiltero), la bele terkulturitajn, sed pro la sekeco debruliĝintajn plugejojn. Ĉie ni vidis helianto kak maizo-parcelojn, ties fruktoj estis maturaj por rikoltnecesa stato. Nigran teron ni ne vidis, nuer sablan grundon.

Bábolna grandvilaĝo troveblas en departamento Komárom – Esztergom (Esztergom), inter Vieno kaj Budapeŝto, ĉ. duonvoje, de sudo de la 94-a kilometro-sekco de la M1-a aŭtovojo. Ĝia teritorio estas ĉ. 34 kvadratkilometroj.

La unua skribita memoraĵo de Bábolna, devenas el la 1268. Sian nomon ĝi ricevis pri siaj iamaj havantoj, de la familio Babunay. La preĝejon levitan je estimo de Sankta Georgo (kio detruigis en 1529) oni menciis jam la datitaj ĉartoj de la 1328-a jaro. De 1635 dum 1 ½ jarcentoj kune kun la setlejo ankaŭ ĝin posedis la familio Szapáry (Sapari). Poste la Ŝtata Ĉevalbredejo komencis sian funkcion . pro ordono de imperiestro Jozefo II-a, estiĝinta instituto donis la ĉeval-rekompletigon al la militoj de la Aŭstro-Hungara Monarkio. Bábolna ankaŭ nun estas „Citadelo” de la ĉi tie daŭranta ĉevalbredado kaj rajd-tradicioj. La Shagya (Ŝhadja) arabaĉeval-bredejo (grego) estas kulminmarko en tuta Eŭropio. Nomon de Bábolna faris konata ne nur la ĉevalbredado, sed ankaŭ la rezultoj kaj produktaĵoj de la ĉi tie

funkcianta agrikultura uzinego. Ĝian nomon famigis tutmonde la prilaboro kaj disvastigo de la produktsistemoj (de maizo, kortbirdo, porko, furaĝo...) servante kiel bazo de la moderna agrikultura produktado.

Menciindaj programoj estas, kiujn organizas la Bábolnai Nemzeti Ménesbirtok KFT (Nacia Ĉevalbredfarm-Posedaĵa KLR de Bábolna):

- En ĉiujara junioaranĝata Internacia Arabĉeval'-Bredbestrigardo (kiu gajnis por si mem internacian rekonon).
- Al la aŭg.20-a festo ligiĝantaj: Festaj Tagoj de Bábolna (En ties kadro okazas kaj internacia Rajdsaltada Konkurso kaj ankaŭ Popolarta Foiro.)
- Krome kune kun la I.M.O. - A.S, (Industrieca Maizproduktiga Organismo - Akcia Societo) ĉiujare en septembro aranĝataj Internaciaj Mastro-Tagoj, Fakekspozicio kaj Foiro.

Gravas mencii, ke loĝantoj, entreprenoj kaj nature la konsilio de urbo Bábolna kaj kune kaj ankaŭaparte organizas landajn kulturajn aranĝaĵojn, sport-tagojn pr. ĉiumonate.

Bábolna iĝis memstara vilaĝo ekde 1958, kaj urbo ekde 2003. En vivo de urbo Bábolna (ankaŭ el vidpunkto de ligiĝo al EŬ) gravaj estis kaj estas ankaŭ nun: la ĝemelurbokontaktojn kun la setlejon de Aŭstrio: Sieghartskirchen, kun la dana : Arden, kun la slovakia Mostova. Dum la pasintaj jardekoj ĝi grandsignife evoluis. El la pusto (ebenaĵo) ĝi iĝis grandvilaĝo, poste malgrandurbo, kies enloĝantnombro estas 4000. Ĝi havas gravan elstaron de la averaĝo, rilate la infrastrukturon: tergasretaron, la akvo- kaj biologia poluakvopurigado, telefono, kablotelevido kaj propra studio, la elkonstruitaj vojoj. Ĉ. nur 3% estas la senlaboreco. Al Bábolna povos doni novan altiron kaj aspekton, ke sur ĝia tereno oni planas la proksiman profitigon de la 52C°-a kuracakvo.

Menciinda estas en Bábolna, tial mi proponas por rigardo:

- sur la strato Mészáros, la konstruaĵo de la Tiszti Kaszinó (Tisti Kasino=Oficira Kazino), en kiu restoracio, kafejo, muzeo – la lasta prezentanta la historion de la
- ĉevalfarmo – kaj kroma ĉambro atendas la tien vizitantojn.
- La unu nava bele instalita, en la 18-a jarcento konstruita katolika preĝejo de Bábolna, en kiu oni kutimas aranĝi ankaŭ koncertojn.
- En la preĝejon antaŭanta parko videblas la monumento de la en bataloj mortfalintaj ĉevaloj de Bábolna, kreaĵo de Iván Szabó. Sur ĝia bazo skribita estas: „Al la plej fidela militkamarado.” Sub ĝi videblas la denombro de la grandaj interbataloj de la periodo 1789-1945



- En la kastelparko staranta kalvinana kapelo, inaŭguritis en 1934.
- En la kastelparko funkcias la Ĉasistmuzeo kaj la ĉaromuzeo. Ĉi lastaj estas viziteblaj nur laŭ antaŭa anonciĝo. En unu muzeoĉambro ricevis lokon la historiekspozicio de la al dujarcenta pasinto rerigarda arabĉeval-bredado kaj samokaze la ĉevalbredado de Bábolna. Oni povas rigardi ĉi tie la fondajn dokumentojn, la samepokajn jungilarojn, kaj la premiojn gajnitajn en diversaj konkursoj. Inter ili la plej valoraj ligiĝas al la ĉevalo, nomita Imperial.
- Al inter la vidindaĵoj estas viciginda ankaŭ la artobjekt-karakterata iama kastelo de familio Szapáry, kio nun estas la centra konstruaĵo de la ĉevalarfarmo.
- En la kastelparko staras ĉ. 300 jara akaciarbo, sur kies subo staras memortabulo de la plejvalor-pasinton havanta bred-virĉevalo de Bábolna.
- Sur la kastelmuro memortabulo:
 - „Je memoro de famaj ĉevaloj de Bábolna”
 - „Alvenos la tempo, kiam nia patrujo plenplenos per bonaj kaj rekomenindaj ĉevaloj, kiam sur nia patrolanda tero ĉio floros kaj ĉiu bone vivos, kiu ensuĉasĝian aeron... Grafo István Széchenyi (Ištvan Sechenji).”
- De orienten de la nuna malgrandurbo, apud la strato Csikótelepi (Ĉevalid-kolonia), libere estas vizitebla ankaŭ la memorejo de plej famaj ĉevaloj de Bábolna.
- La arbareto, fondita je antaŭo de la 1970-aj jaroj, estas ŝatata loko de la ripozon dezirantoj kaj natureblecojn ŝatantoj.

En la festo de punto, la 25-26-an de aŭgusto 2007-a, la Mátray-Ház (Domo-Mátray) disdonacadis „Orpunto-Premion”. Dum 1994, en familia entrepreno la Domo-Mátray fondis la „Orpunto-Premion.” Ĉi ties fondintoj estas samokaze fondintoj ankaŭ de la

KLR Domo – Mátray:

D-ro Árpád Mátray	homeopatulato,
Magdalena, s-rino Mátray	Majstro de la Popolarto, instruisto de puntofaro,
f-ino Gyöngyi Mátray	filologo



La simbola fikso estas de celo de la „Orpunto-Premio”

- en la movado De la puntofaro ĝi instigas la kreantojn al kreo de tiu artaĵo, kiu gardas la puntpreparajn tradiciojn kaj vojon montras tra la nuno al la estonto.
- En tiun estonton, en kiu oni ornamas vestaĵpecojn, loĝejteksaĵojn, ekleziajn teksaĵojn kaj ceterajn uzobjektojn per la elstaraj teknikaj mirakloj.
- En intereso de la difinita simbolfikso; la inspiron donantan eraojn oni anoncas ĉiam laŭ la eventoj de la hungara historio.



La forpasintajn du jarojn inter la festaj premiodisdonadoj, oni konsumas tiel, ke

- en antaŭpreparigaj prelegoj per la historio de l' decidita epoko,
- prezentante la arkeologiretrovaĵojn, kaj de la legendoj plimultigu la konojn de la konkursantoj. La prelegojn finas: arkeologoj, muzeologoj, restaŭristoj, historiistoj.

La premiodisdonoj okazas po du jaroj en Bábolna, en kadro de ekspozicio en la sekvaj kategorioj

- permana batata punto,
- permana kudrita punto,
- permana aĵura-punto,
- miksateknika permana punto.

La ĝis nun anoncigitaj temoj estis

- en 1996: Epoko de la patrujkonkero (1.)
- en 1999: Epoko de Regnestroj, post la patrujkonkero (post Kristo 896-1001) (2.)
- en 2001: Reĝo Stefano I. La Sankta kaj lia epoko (P.K.:1001-1038) (3.)
- en 2003: Ĉapitroj el erao de la hungara historio inter 1038-1074 / elstarvidpunkte al reĝoj: Aba, Sámuel, - episkopo Gerardo la Sankta, – László la Sankta kaj ilia erao. (4.)
- en 2005: Reĝo László la Sankta kaj lia erao (1077-1095) (5)
- al 2007: la anoncita temo estis la erao de reĝo Kálmán Könyves (Kolomano la librojn havanta) (1095-1116) (6)

La kreantoj kaj gajnintoj de la 2007 jara konkurso estis

- | | | | |
|---------------------------------|----------------------|---------------|-------------------------------|
| S-rino Jakab, Andrásné: | „Orpunto-Premio” | en kategorio: | permana batata punto |
| s-rino Tóthné Kiss Szilvia | „Arĝentpunto-Premio” | en kategorio: | permana batata punto |
| s-rino Berta, Sándorné | „Orpunto-Premio” | en kategorio: | miksateknika
permana punto |
| s-rino Czemplé Adamicza Renata: | „Arĝentpunto-Premio” | en kategorio: | permana nodita
punto. |

Je eldono de la konkursoj, oni devas pagi anonc-koston. Al la konkurso bonvenataj estas kaj en-, kaj eksterlandanoj. Oni tion esperas, ke ankaŭ inter la eksterlandanoj estos tiuj,

kiuj bone trastudas la anoncitan epokon de la hungara historio kajn el ĝi tiu povas ĉerpi inspiron.

Sinjinorino Magdalena Mátray pridiris al ni sian formulitan penson, kreinte pri la puntofaro:

- „La punto estas tia reĝino de la teksaĵarto, kiu ĉiam servas kaj ne regas.
- Ĝi servas, ĉar per sia subtileco akcentas la belecon de la teksaĵo, kaj per la ceteraj ornamteĥnikoj ekdonas ties solenecon.
- Ĝi servas, ĉar per sia beleco montras la lertecon de la preparaj laboremaj manoj kaj la persistan paciencon de ilia havanto.

La tutan vivon de ni: puntofaristoj, traefikas tiu ĉi servado kaj direktado.”

Skribis kaj esperantigis: s-rino Adrienne, s-rino Pásztor

- daŭrigo sekvos -



SAGDIROJ

Amikeco

Por havi amikon, estu amiko.

Amo

Alte estimu la amon ricevitan. Ĝi persistos eĉ tiam, kiam viaj oro kaj sano estas malaperintaj.

(El kolektaĵo de d-ro Endre Dudich)

Stefano Pál

Historio de la Miskolca esperanto-Movado UNUA PARTO.

Unua kvaronjarcento de Esperanto 1887-1912

/ De la varsovia libro ĝis la miŝkolca librovendejo./

Lingvo de Zamenhof – ankaŭ Johano Bolyai.

Kiam en 1960 en Miskolc kiel iu programo de la 3-a Nordhungaria Esperanto-Renkontiĝo oni inaŭguris memortabulon de la strato Zamenhof, tiam loĝantoj de la ĉirkaŭantaj domoj apenaŭ sciis ion pri la esperanta lingvo kaj ties kreanto. Ili ne sciis, ke antaŭ la lingvo de Zamenhof ekzistis 174, post tio 116 lingvoeksperimentoj, kaj el inter tiuj nur Esperanto restis vivkapabla. Eĉ tion ili ne sciis, ke inter jaroj 1772 kaj 1913 troviĝis 7 hungardevenaj lingvokreantoj, inter ili Johano Bolyai, mondfama hungara matematikisto, kiu faris sian lingvoplanon. La gramatiko de Zamenhof, kies ŝlosilo estis la genia afiksosistemo, jam en 1878 pretiĝis, sed nur post la praktika perfektigo sukcesis eldoniĝi la 14-an de julio 1887 en Varsovio.

La unua kvaronjarcento

En 1897 profesoro Gabrielo Bálint instruas la lingvon kaj Ábel Barabás eldonas lingvolibron en Cluj / en 1897-98 /. Paŭlo Lengyel aperigas en urbo Szekszárd en 1900 la unuan hungarian esperantan revuon la „Lingvo internacia”, poste ĉi tiun sekvas en 1904 la „Esperanto”, en 1907 „La verda standardo.” En la unuaj jaroj de apero de „Lingvo internacia estis gimnaziano en Szekszárd Ludoviko Király (de 1904), elstara personeco de la miŝkolca Esperanto-Movado. Li tie aŭdis unue pri la lingvo Esperanto de sia kara amiko kiu estis la filo de Paŭlo Lengyel. En la lando la Esperanto-vivo vigliĝas. En 1901 en Budapeŝto fondiĝas la unua Esperanto –grupo, en 1911 parlamenta interpelacio aŭdiĝas en intereso de Esperanto, poste en 1912 fondiĝas la Hungaria Landa Esperanto- Societo kaj en 1913 la Societo de la Hungaraj Esperantistaj Laboristoj.

Miŝkolcaj famecoj

Apenaŭ pasas kelkaj jaroj post la varsavia apero de la unua gramatiko de Esperanto, kiam naskiĝas Ludoviko Király la 19-an de Aŭgusto 1889 en Szekszárd, Julio Baghy en Szeged la 13-an de januaro 1891, Kolomano Kalocsay en Abaújszántó la 6-an de oktobro 1891 kaj Ludoviko Győry Nagy en Gömörmihályfalva la 12-an de marto 1892.

Ili ĉiuj havis malvastan kontakton kun Esperanto kaj Miskolc ĝis vivofino.

Kolomano Kalocsay finis la bazlernejon en Miskolc sur placo Sankta-Anna, dum 8 jaroj lernis en la nuna Földes kaj Lévai- gimnazioj, en la pli lasta abiturientiĝis en 1909.

Ludoviko Győry nagy – pro la tien enoficigado de la patro – en Miskolc daŭrigis de septembro 1906 siajn gimnaziajn studadojn kaj estis samklasano kaj sambenkanano de Kolomano Kalocsay. Tiutempe komenciĝis ilia amikeco, kiam ankoraŭ ne konis Esperanton.

Ludoviko Király / Kőnig / en la jaro 1910 estis universitatano en Budapeŝto kaj de iu samklasano /post 1904/ duafoje aŭdis pri Esperanto, de kiu li ricevis lecionojn kaj lernolibron. Post unu monata lernado somere de 1910 dum iu fervoja vojaĝo kun eksterlandaj esperantistoj daŭrigis perfektan konversacion.

Julio Baghy /kiel lia patro Julio Baghy / estis aktoro, multfoje rolis en Miskolc en ensemblo de diversaj direktoroj. Li estis notario de la landa aktorsocieto. Lian aktoran roladon oni menciadis inter eminentuloj de la ensemblo. La gepatroj rolis kaj loĝis en 1899-1905 en Miskolc, en la „Rákóczi-domo” kune kun la juna Julio Baghy.

La unuaj okazintaĵoj - Libroj en la montrofenestroj.

El inter la menciitaj, Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy translokiĝis al Budapeŝto de siaj miŝkolcaj loĝlokoj kaj iĝis mondfamaj. La aliaj du, Ludoviko Győry Nagy kaj Ludoviko Király ĝis vivofino determinis Esperanto-movadon de la departemento kaj departementrezidejo.

La unuajn paŝojn ĝis 1913 duope faris: Kolomano Kalocsay kaj Ludoviko Győry Nagy.

Pri la afero de esperantan lingvon lernantoj kaj komenco de la movado la rememoroj ne estas homogenaj. Laŭ iuj en 1911, laŭ aliaj en 1912 oni komencis lerni en Miskolc la esperantan lingvon, sed la unua organizita lernokurso certe en 1912 okazis, ties aŭtentikan historion, kiel ĉefrolanto, D-ro Ludoviko Győry Nagy eternigis.

Kolomano Kalocsay tiel rememoras pri sia konatiĝo kun la esperanta lingvo:

„Antaŭ pli ol sesdek jaroj mia amiko Ludoviko Győry Nagy kaj mi ekvidis iun esperantan lernolibron en montrofenestro de iu miŝkolca librovendejo... La libron ni aĉetis, ni lernadis en la somera ferio kaj plej bone tio surprizis min, ke ĝis Septembro jam ellernis”.

Somere de 1912 - Jaro de la lingvolernado

En Aŭgusto de 1912 Ludoviko Győry Nagy kaj Kolomano Kalocsay en montrofenestro de Béni Ferenczi, miŝkolca librokomercisto ekvidis la esperantan lingvolibron.

Tiel ŝajnas, ne nur ili interesiĝis en Miskolc pri la esperanta lingvo, pri kio ankaŭ gazetanoncoj vokis la atenton. Jam en 1910 laŭ iu miŝkolca gazetfamo „ankaŭ en nia urbo multe da homoj lernas la esperantan lingvon”.

Ludoviko Győry Nagy kaj Kolomano Kalocsay lernis ne nur el libroj, sed ili ankaŭ korespondadis kun eksterlandaj esperantistoj kaj abonis ankaŭ esperantajn gazetojn. Ĝi Tiutempe Kalocsay skribis poemojn kaj hungare kaj esperante. Liaj kelkaj poemoj aperis ankaŭ en „Okcidento”. La du – nun jam entuziasmaj – esperantistoj, ĉefe Ludoviko Győry Nagy ne kontentiĝis per ĉi tio. Li tion pensis, ke nur tiel eblas utiligi, perfektigi ilian

esperanto-scion, se somere de 1913 ĉen Miskolc oni gvidus lernokurson kaj ties inaŭgura prelego petus tiaman prezidanton de la Hungara Esperanto-Asocio.

Mallonga kroniko de dek jaroj.
/1913-1923/
/miŝkolcaj famaj pioniroj de Esperanto/

Komenco de la movado – la unua propagandoprelego.

Unua granda sukceso de Esperanto estis en 1905 en la franclanda Boulogne-sur Mer=Poste ĉiujare en aliaj ĉefurboj oni aranĝis Esperanto-kongreson kaj nature en 1912 la jubilean okan okaze de la 25-a datreveno de apero de la lingvo en Varsovio, kie tiu naskiĝis. Okaze de tiu ĉi oni eldonis bildkarton kun surskribo „eminentuloj” kaj fotoj de 13 esperantistoj inter kiuj estis du hungaroj. Unu el ili estis Aleksandro Giesswein, prezidanto de Hungara Esperanto-Societo. Lin petis Ludoviko Győry Nagy, por prelegi la 13-an de julio 1913, kiun daton oni publikigis tre originalmaniere. Ludoviko Zsarnay, kiu pli malfrue aliĝis al ili /li estis du jarojn pli juna universitatano/, faris alvokon skribite sur afiŝon kaj apud ĝin starigis siajn du etajn kuzinojn, fotis ilin, kaj el la foto faris bildkartojn kiujn dissendis.

Dum la menciita tago D-ro Aleksandro Giesswein alvenis al la miŝkolca Tiszai-fervojestacio, kie, komisiata de la urbestro, je la nomo de la urbo akceptis lin ĉefnotario D-ro Aleksandro Hodobay. Dank’ al la bona organizado, la solenejo de la urbodomo tute pleniĝis, la prelego estis sukcesa.

La unua lernokurso – Foto pretiĝis pri tiu.

Efike de la alvoko kvindek personoj anonciĝis, kiujn oni dividis en du grupojn. La iun gvidis Kolomano Kalocsay, la aliajn Ludoviko Győry Nagy. La kurso daŭris dum kvin semajnoj, ~~pe~~ semajne du prelegoj okazis en la Deák-strata komerca mezlernejo. Fine de la kurso oni faris eĉ foton.

Inter la miŝkolcaj kursanoj estis ankaŭ Aleksandro Vándor, kies gvidanto estis Kolomano Kalocsay. Pli malfrue inter ili kunliga kontakto estis la poezioj de Attila József kaj Endre Ady.

Ekz. Aleksandro Vándor =muzikigis „La lago ridis” titolan poemon de Endre Ady kaj tiun dediĉis al Kolomano Kalocsay, tradukanto de la poemo.

Rememoraĵo de Ludoviko Győry Nagy aludas tion, ke la kursgvidado de Kolomano Kalocsay por li fortigis la Esperanto-scion, la literaturan disvolviĝadon.

La 25-an de Aŭgusto 1913 Ludoviko Győry Nagy festis lian 21. nomtagon. Okaze de tiu ĉi Kolomano Kalocsay skribis esperantlingvan salutantan poemon.

La sekvan, 1914.jaran kurson la milito fiaskigis.

Dum la unua mondmilito – laŭ lingvo de la paco.

En la jaro 1914 eksplodinta mondmilito kaj la mobilizadoj haltigis organizan vivon de la movado. La 11-an mondkongreson, planitan en Parizo, en la jaro 1914 oni ne aranĝis. Ankaŭ Zamenhof nur ĉirkaŭvoje povis reiri en sian patrion. Dum la milito, la 1915. jara oktobra numero de la budapeŝta „La verda standardo” alvokis la atenton de la en militarmeon soldatiĝitaj hungaraj esperantistaj soldatoj, ke ankaŭ sur la bataalkampo portu verdan stelon de la esperantistoj, ĉi tiel esprimu ilian militkontraŭecon.

Julio Baghy de 1915 dum ses jaroj en la siberia militkaptitejo organizis esperantajn lingvokursojn inter liaj diverslingvaj samsortuloj.

Ludoviko Király en 1916-17 en la fronto por liaj soldatkamaradoj organizis kurson kaj ankaŭ esperante konversaciis kun finndevenaj soldatoj dum paca tranĉeo-renkontiĝo.

Ankaŭ Kolomanon Kalocsay oni soldatigis por kuracista servado. Li portis tien esperantajn literaturajn librojn kaj maldeprine skribis, tradukis poemojn.

Ludovikon Győry Nagy oni soldatigis finntarae de la milito. Li vundiĝis en 1918. Dum la Konsiliantara Respubliko en Miskolc li estis notario de la Respublika Tribunalo, pli frue ties akuzpolicano.

Pro tio ĉi pli poste oni enoficigis lin al Mezőcsát kiel advokaton, en 1920-25.

-daŭrigo sekvas -

Trafa respondo

Komence de la 20-a jarcento okazis, ke iu knabo, lernanto, demandis al sia patro: “Ĉu pravas, ke ni devenas de la simioj?”

La patro, surprizite, metis flanken la gazeton. Iomete li pensadis, poste firme respondis.

“Mi neniel devenas de simio, sed vi certe jes!”

(La supran historion mi aŭdis en tramo, kiam du maljunulinoj babiladis inter si. Hejme mi tuj esperantigis kaj sendis al esperantista korespondantino, en 1976. Verkis Adrienne, s-rino Pásztor)

Ripozo

Ni iris al nia hejmo el la interna urbo, kune kun nia trijara filo. Li estis laca kaj mishumora. Li ĉiamaniere volis sidiĝi sur la vintra strato sur la neĝkaĉan trotuaron. Mi ne permesis tion, do li forte, histerie ekploris.

Unue mi silentigis lin, sed poste lasis fari, ĉar jam ankaŭ mi tre sopiris la baldaŭan hejmingon.

Li ankoraŭ ploretis, sed subite li ĉesis. Turnante min ĝoje al li, mi diris, ke mi ĝojas, ke li lasis la ploradon.

Li tuj sciigis min, mi ne pensu, ke li finlasis: li nur ripozas.

Adrienne, sinjorino Pásztor

La 2008-a, estas jaro ankaŭ de la Lingvoj
Tiuokaze ni prezentas belan poemon de Nikolao Hovorka.

Nikolao Hovorka

Patrujo

Tre grandan patrujon havas mi sur tero,
Ĝi estas al mi dolor' kaj espero.

Sep gentojn mi sentas ja en mia sango,
Al ĉiu mi ŝuldas sammulte da danko.

Jen: saksa, kroata; jen: ĉeha, bavara,
Jen ankaŭ viena, jen franca, itala.

Kaj kiu donacis la plej bonan guton,
Ne scias mi: sentas la sep kiel tuton.

Ĉi sango multgenta pasie rondiras
En mi kaj ĝi amas, inspiras, sopiras.

Ĉi sangon multgentan nur unu motoro
Pulsigas, vivigas en mi: mia koro.

Ĉi sango multgenta per sankta magio
Por unu batas, por unu patrio:

Plej kara patrujo sur nia terglobo:
Ho, sankta, fiera, eterna Eŭropo!

Nikolao Hovorka, (antaŭ milite. Barono de Zderas), aŭstriano, verkisto, ĉefredaktoro de la germanlingva periodaĵo, „Berichte” (Wien-Vieno). Naskiĝis la 6an de Decembro 1901 en Tesliĉ, Bosnio. En sia revuo li donis konstantan rubrikon al Esperanto. Li estis prezidanto de la Es-j: UEU en Wien, EOO de ubo Wien. Kunfondinto kaj sekretario de la Laborkomitato de sukcesplenaj Cseh-metodaj kursoj en Wien dum printempo 1932. Nun sekretario de AEA. Subtilvoĉa poeto, al kiu la poemo estas festotaga plezuro. Malgraŭ tio, ke Hovorka ne verkis ankoraŭ multe da poemoj, lia animklavaro eksonigas diversajn melodiojn, kelkfoje kun forta kolektiva sento, kies karakteriza ekzemplo estas la poemo *G e f r a t o j k u n i g u l a m a n o j n*.

(L. M. 1932. p. 150.F. Szilágyi – Eo-Enciklopedio-Eld. 1968 Bp)

Famaj Tagoj, Mondotagoj de Marto

La 1, 8 de Marto: la 1-an de Marto de 1954, USONO faris hidrogenbombo-eksperimenton sur la insulo Bikini. Radioinfektado atakis la ŝipanaron de la fiŝkaptista ŝipo Fukura Muru, laborinta sur la Pacifika Oceano. Je memoro de tiu tragedia evento, kaj okaze de la Marta 8-a Internacia Virintago, – je peto de Osioka Taeko – nun László Pásztor sendis pac’-salutojn al virinoj, fraŭlinoj kaj knabinoj de Japanio.

La 15-a de Marto: estas Nacia Festo de la Hungara Respubliko, je memoro de la 1848-1849-a Revolucio kaj Sendependeca-liberecbatalo de Hungaroj kontraŭ la Habsburg-reĝimo de Aŭstrio.

La 21-a de Marto: estas Mondotago de la Kontraŭ-batalo de la Rasa-Distingado.

La 21-a de Marto, estas Mondotago ankaŭ de la Poezio.

La 21-a de Marto, estas Mondotago ankaŭ de la Planetara-Konscio. Laŭ sia tradicio la homo trasantas, ke la homaro havas unuecon!

La 23-a de Marto: estas Mondotago Meteologia. Ĝin ni festas ekde 1960.

La meteologiaj konoj estas nemalhaveblaj al la suprenpafoj de raketoj, kosmoŝipoj.

La meteologio (greka esprimo) estas scienco, okupiĝanta pri la Atmosfero kaj la en ĝi okazantaj fizikaj procezoj. Ĝi estas teritoriparto de la Geofiziko. Ĝi aplikas la metodojn de la fizikaj konkludoj, la geografia superrigardo kaj matematika statistiko laŭ la indikoj de meteologiaj observadoj finitaj –en esploroj sur multnombraj lokoj de la tero.

Ĝiaj branĉoj estas:

- 1, La Teoria aŭ Dinamika Meteologio= regvidas la atmosferajn procezojn al la egzaktaj leĝoj de la teoria fiziko;
- 2, La Ĝenerala Meteologio = donas la priskribon de la atmosferaj fenomenoj kaj klarigon de la eksperimenta-fiziko.
- 3, La Klimatologio = observas la sistemon kaj komunon, okazantaj en aera spaco de la diversaj teritorioj de la tero;
- 4, Veterindik-Doktrino aŭ alinome Sinoptika-Meteologio = faras veter-prognozojn laŭ bazo de teritoria analizo de veteraj procezoj.

Ĝiaj aplikitaj branĉoj estas:

- 1, La Aviada Meteologio = esploras la meteologiajn rilatojn de la aertrafiko,
- 2, La Naŭtika Meteologio = okupiĝas pri la aerspaca vetero de maroj.
- 3, La Bioklimatologio = esploras la interrilatojn de la atmosfero kaj ĝiaj vivfenomenoj.
- 4, La Agrometeologio = studas, analizas la efikon de la vetero kaj klimato, koncerne la kampan-ĝardenkulturadan, arbarkulturitan kreskaĵprodukton kaj la brut-bredadon.
- 5, La Kuracista Meteologio = studas la veterajn kondiĉojn de la malsanoj kaj kuracado.
- 6, La Municipa (Juĝeja)Meteologio = analizas la interrilatojn de la juĝado kaj la veteroj.
- 7, Radio-Meteologio = faras kompleksan atmosfer-ekzamenon per la esploro de disvastiĝo de radioondoj.

Ĉ. ekde1981 ni spertas la diversajn signojn de la klimatŝanĝiĝo de la Tero.

Tiuj estas jam mondskalaj.

Kelkloke malsufiĉas la precipitaĵo. Aliloke diluvspecaj pluvegoj falas surteron. La polusaj glacimontoj degelas. La sezonoj 1-2 monatojn prokrastiĝas. La ĝisnunaj popolaj veterprognozoj komencas perdi sian fidecon. Ĉi tiuj estos bonaj en la estonto nur tial, ke ili

pruvu: iam estis tempo, kiam vintre vintro estis, printempe printempo, somere somero kaj aŭtune aŭtuno.

(Laŭ Hungara Vikipedio: Famaj Tagoj Mondotagoj kaj Nova Hungara Leksikono 1961-jara, Adrienne, sinjorino Pásztor)

FAMOJ

LA 26-A MISKOLCA INTERNACIA MINERALFESTIVALO okazis la 8-an kaj 9-an de Marto 2008-a, en la Universitato de Miskolc. Pri la Festivalo ni skribos pli malfrue.

Adrienne, s-rino Pásztor

POLA EKSKURSO

La altestimata prezidantino de PEA: **Halina Komar**, kun 50 membra grupo alvenos en Miskolc, por viziti nian regionon NORDHUNGARIO.

20 geesperantistaj grupanoj atendos la momenton renkonti nin.

La alveno okazos la 4-an de Aprilo 2008-a kaj ili restos ĝis la 6-a de Aprilo.

Ilia vizito de la „Montsubo” Vinregiono komenciĝante ĉe Abaujszántó, riĉigos ilian programon.

Ni, hungaraj geesperantistoj kore deziras, ke ili fartu bone ĉe ni!

Adrienne, s-rino Pásztor, la organizanto

INTERNACIA VIRINA TAGO

Ni ricevis la malsupran leteron:

„Kara S-ro László Pásztor,

Mi raportas pri nia Virina Tago.

En Hirosima la 8an de marto okazis kunveno de la Internacia Virina Tago de UN ĉe Suda Kultura Halo kun 500 partoprenantoj, kaj ĉiuj ricevis broŝuron de viaj mesaĝoj.

Krome, de la 2a ĝis la 9a, marto, ĉe la Urba Virina Eduka Centro okazis ekspozicio de la mesaĝoj, kaj 200 vizitantoj legis interese ĝin sume 157 mesaĝojn el 50 landoj:

el Azio(17):

Barato 2/ Ĉinio 3/ Irano 1/ Israelo 3/ Kazahio 1/ Koreio 2/ Nepalo 2/ Pakistano 1/
Uzbekio 2/ el Oceanio(6):Aŭstralio 5/ Novzelando 1/

el Nordameriko(9):

Kanado 3/ Usono 6/

el Sudameriko(7):

Argentino 2/ Brazilo 2/ Kostariko 1/Kubo 2/

el Afriko(10):

Benino 2/ Gano 1/ Kongo 1/ Komoro-insuloj 1/ Madagaskaro 1/ Niĝerio 1/ Senegalio 1/
Sudafriko 1/ Togolando 1/

el Eŭropo(108):

Albanio 2/ Belgio 5/ Britio 1/ Bulgario 3/Ĉeĥio 4/ Danio 3/ Finnlando 3/ Francio 33/
Germanio 4/ Hispanio 3/ Islando 3/ Italio 9/Hungario 5/ Kroatio 1/ Luksemburgio 1/ Malto 1/
Nederlando 4/ Norvegio 2/ Pollando 5/ Rusio 4/ Serbio 5/ Svedio 3/ Svislando 3/ Ukrainio 1.

Danke al vi karaj, mi plu luktas, luktos pli pasie por morgaŭa pli bona mondo.
OSIOKA Taeko”

Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” gratulas al la atingita sukceso, kiel bela rezulto de la entuzisma multa laboro.


László Pásztor

JULIO BAGHY



Okaze de mortotaga datreveno de Paĉjo (Julio Baghy), la geedzoj Pásztor florkronis lian tombon en la tombejgardeno Farkasréti de Budapeŝto.

Geedzoj Pásztor



Húsvéti tojás variációk

20

Kopcsik marcipanio en urbo Eger
Agrablan Paskon!



NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Király u.25. 2/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Retpošto: pasztor.laszlo4@chello.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>

MSN: pasztor.laszlo4@chello.hu